

James Krüss,  
Enlitiĝi devas vi

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Enlitiĝi devas vi,  
ĉar jam la malhelo  
de l' vespero ĉirkaŭ ni  
nun ekregas ĉie ĉi,  
lumas hela stelo.

Dormos baldaŭ jam la sun'  
en la nigra spaco.  
Kaj la viro sur la lun'  
iras en la liton nun  
pro treega laco.

La paseroj de l' tegment'  
iris en la nestojn.  
Sin kuŝigis eĉ la vent',  
nur la kat' en la silent'  
ĉasas nokte bestojn.

Ĉar fariĝis nun vesper'  
ĉiuj sin kaŝigas.  
Sed kelkiun la mizer',  
la doloro kaj sufer'  
tute maldormigas.

...

James Krüss,  
Hanselmann muss schlafen gehn

\_\_\_\_\_

...

*Traduko de la Germana poemo "Hanselmann muss schlafen gehn" de JAMES KRÜSS (Jakobo Krujso, \*1926-05.31 – †1997-08.02) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1983.*

*MR-082-1 / Arg-669-1344 (2012-11-21 19:37:30)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JAMES KRÜSS (Jakobo Krujso, \*1926-05.31 – †1997-08.02).*

*Arg-669-1343 (2012-11-21 19:24:38)*